

Eŭropa Bulteno

Novembro 2019, Numero 197

LABORPLANO DE EEU POR 2020



Per la koresponda kunsido de la estraranoj en novembro 2019 baze de la propono de la sekretario Zlatko Tišljar estis akceptita la orientiga Laborplano de EEU por la jaro 2020, kiun ni prezentas ĉi-sube. La tuteŭropa membraro rajtas kontribui per rimarkoj kaj proponoj. Faru tion ĝis la fino de decembro konsiderante la realajn financajn kaj personarajn kapacitojn de EEU.

1. Ellaboro de 3-5 novaj projektoj baze de konkursoj de Eŭropa Komisiono kaj transdono al la koncernaj fondaĵoj inter kiuj por Eŭropo por civitanoj kaj Erasmus+.
2. Organizo de la kunsidoj de la Asembleo de EEU dum la German-Pola Espernto-Kongreso en Frankfurt/Oder kaj Slubice la 29an de majo kaj la unuan de junio.2020 dum kiu oni prezentos raportojn kaj planojn kaj diskutos pri strategio de EEU. Krome oni elektos novan estraron de EEU por la sekva trijara mandato.
3. Preparo por la Asemblea elekta kunveno:

- organizi elekton de assembleaj membroj por la plua trijara mandato petante ĉiujn landajn asociojn proponi novan membron,
 - inviti la landajn asociojn proponi novajn kvin estraranojn
4. Kunlaboro kun nova membrino de Europa Komisiono por kulturo kaj edukado prezentante al ŝi novan projekton finfaritan de esperantistoj: MLA kaj proponate al ŝi enkonduki la MLA-lernejan objekton al deko da elementaj lernejoj en diversaj EU-landoj.
 5. Kunlaboro kun novaj EU-parlamentanoj esperantistoj: Ljudmila Novak el Slovenio kaj tri poloj kaj kun ili ellabori planon kiel kontribui al pli bona kaj efika lernado de fremdlingvoj en EU.
 6. Ellaboro de nova projekto por Erasmus+ kiel daŭrigo de la realigita MLA kiu celos per eksperimenta uzo de la lernobjketo en EU-lernejoj kaj scienca mezuro de rezultoj pruvi kiom la MLA plisukcesigas la lernadon de aliaj fremdlingvoj, kaj ties trandsono al Erasmus+ por realigo kaj financado de 2021 ghis 2024.
 7. Disvastigo kaj informado pri MLA en laŭeble multaj elementaj lernejoj de EU.
 8. Pluaktivi en Platformo por multlingvismo de Eŭropa Komisiono kune kun E@I.
 9. Eldoni libron paperforman pri la stato de Esperanto-movado en Eŭropa Unio kiel kolekto de 28 artikoloj pri la movadoj en 28 EU-landoj, kiujn ni aperigis en Eŭropa Bulteno inter 2010 kaj 2013 kaj kreis elektronikan formon de la libro troviĝanta en nia paĝaro.
 10. Partopreno de EEU-representantoj en laŭeble multaj internaciaj neesperantistaj konferencoj kiuj traktas lingvajn kaj identecajn temojn.
 11. Prelegoj kaj partopreno de la estraranoj de EEU en laŭeble multaj konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de EEU al kiuj ili estos invititaj,
 12. Stimulado de landaj asocioj prezenti proponon en siaj landoj por akiri statuson de nacia kultura heredaĵo por esperantaj kulturaj atingiĝoj en la koncernaj landoj kiel tion atingis la poloj kaj kroatoj.
 13. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj kaj lokaj societoj okaze de Eŭropa Lingva Tago (26-a de septembro) kiel publikaj prelegoj, ekspozicioj, lingvaj festival(et)oj, aperigo de nacilingvaj libroj pri Esperanto kaj lingva problemoj kaj disvastigante MLA-lernobjekton en lernejoj de EU.
 14. Kompletigadi la retan kurson de E per komuna baza lernilo por komencantoj en ĉiuj ligvoj de EU baze de la eltrovita fundamenta morfemlisto de la plej oftaj morfemoj en parole kaj skribe uzata Esperanto (esploroj de Z. Tišljar kaj R. Gerard) en la retejo www.learn.esperanto.com.
 15. EEU-kunlaboro kun diversaj mondaj kaj eŭropaj organizaĵoj kiel UEA, TEJO, SAT, EDE, ILEI, AEK, AVE...

16. Redaktado kaj aperigado de Eŭropa Bulteno (11 numeroj sur averaĝe 12 paĝoj en elektronika formo kaj aperigata en nia EEU-paĝaro kaj paĝaro de Remush (<http://remush.be/bulteno/index.html>).

17. Regula kompletigado de informoj en la retpaĝaro de EEU www.europo.eu

18. Disvastigo kaj utiligo de rekomendoj de grava multdisciplina projekto „Movebleco kaj Inkluzivo en Multlingva Eŭropo— (MIME) de Eŭropa Komisiono (2014-2018) prezentita en la dokumento „Vademecum de Movebleco kaj Inkluzivo en Multlingva Eŭropo—. Temas pri la unua grava kompleksa lingvo-politika dokumento de Eŭropa Komisiono pri serĉado de solvoj de lingva komunikado kaj lingvaj politikoj en Eŭropa Unio. Libere akirebla en PDF formato je retpaĝo: <http://www.mime-project.org/vademecum/>

19. Organizati 2 estrarkunsidojn kaj konstantan elektronan komunikadon inter la estraranoj.

Estraro de EEU

STUDOBJEKTO PLANLINGVOJ EN FILOZOFIA FAKULTATO EN ZAGREBO

La nedevisa studobjekto *Planlingvoj*, jam pli ol 10 jarojn tradicie instruata por bakalaŭraj studentoj de la germana lingvo kaj literaturo en Filozofia fakultato de Universitato de Zagrebo, okazas ankaŭ en la vintra semestro de la aktuala akademia jaro 2019/2020 kun 31 partoprenantoj. La enkondukaj lecionoj estas dediĉitaj al la konciza prezentado de la fenomeno lingvoinventado dum la homa historiokun speciala atento al Esperanto kiel fakte la ununura plene funkcia planlingvo ekde sia apero en 1887. Pritraktataj estas ankaŭ la ĉefaj nocioj de interlingvistiko kiel scienco pri internacia komunikado ĝenerale kaj pri planlingvoj speciale. Por ke la studentoj mem spertu la lernadon de planlingvo, kadre de la studobjekto *Planlingvoj* estas instruata Esperanto por komencantoj surbaze de la germanlingva eldono de la Esperanto-lernolibro laŭ la Zagreba metodo.

Kvankam ja tuj ekde la komenco de la enkadrigo de tiu nedevisa studobjekto en la studprogramon de la germana lingvo kaj literaturo estas aŭdataj malmultaj skeptikaj voĉoj pri kongruebleco de *Planlingvoj* kun celoj de la studprogramo de la germana lingvo kaj literaturo, oni povis intertempe konvinkiĝi, ke ĝi estas tre ŝatata de studentoj – ne nur pro la facila kaj kleriga lernado de Esperanto kaj gaja lern- kaj instrueto.

Tiusence gravas ankaŭ la fakto, ke en ĝi unuflanke estas pritraktataj temoj el ĝenerala kaj kompara lingvoscienco konsiderante la lingvajn kaj filologiajn konojn de partoprenantaj studentoj, kaj aliflanke oni malkovras kaj analizas leksikajn kaj vortformadajn elementojn de la germana en Esperanto.

Velimir Piškorec

VIENA ESPERANTO-MUZEO – 90-JARA



Solena inaŭguro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno la 1-an de aŭgusto 1929.

Por soleni la 90-jariĝon de la unika muzeo en Vieno oni aranĝis simpozion pri planlingvoj kaj lingvoplanado. Ĉiuj prelegoj estis en la angla, sed dum la paŭzoj kaj ankaŭ dum la diskutoj post la prelegoj ankaŭ Esperanto estis uzata.

La Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko festis sian 90-jaran jubileon per internacia simpozio pri planlingvoj kaj lingvoplanado. En 1929 okazis la solena inaŭguro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Ekde tiam oni ĉiujare informas kaj surprizas milojn da vizitantoj el la tuta mondo per la fascino de Esperanto. Dum la pasintaj kvin jaroj la Esperanto-muzeo bonvenigis pli ol 85 000 gastojn.

Kiam la Esperanto-muzeo estis oficiale inaŭgurita, la 1-an de aŭgusto 1929 en la pompa salono de la Nacia Biblioteko, ĝi estis unu el la unuaj lingvo-muzeoj en la mondo. Ĝia establo



estis kaj sekvo de pligrandiĝanta intereso pri Esperanto post la unua mondmilito kaj rezulto de kreskanta bezono de centra internacia Esperanto-biblioteko por la multnombraj publikaĵoj kiuj aperis ekde 1887. Du personoj estis aparte gravaj por la fondo: Felikso Zamenhof (1868–1933), kiu havis la ideon por tia biblioteko, kaj Hugo Steiner (1878–1969), kiu tuj transprenis la impulson kaj fondis la Esperanto-muzeon en Vieno.

Por festi la 90-an naskiĝjaron la Aŭstria Nacia Biblioteko kun subteno de Esperantic Studies Foundation (ESF) invitis la 24-an kaj 25-an de oktobro 2019 en Palais Mollard al internacia scienca simpozio pri la temo “Planlingvoj kaj lingvo-planado”. La jubileo de la Esperanto-muzeo donis bonvenan okazon por

retrorigardo al ĝia faceteriĉa historio, por superrigardo pri ĝiaj nuntempaj projektoj kaj precipe por diversaj prezentadoj en la vastaj esplorkampoj de lingvo-muzeoj, planlingvoj kaj lingvo-planado.

Kadre de ok temgrupoj dek ses fakuloj prezentis siajn esplorojn kaj publikaĵojn, kiuj ankaŭ spegulas la havaĵon de la Esperanto-muzeo. Kaj la [programo](#) kaj la [resumoj](#) de la simpozio rete legeblas. La unua tago, dum kiu prelegis interalie Sabine Fiedler, Klaus Schubert kaj Michael Gordin, estis dediĉita al la temoj “lingvo-muzeoj”, “planlingvoj”, “lingvo-planado” kaj “lingvo-planado kaj planlingvoj – biografioj”. La duan tagon sekvis la temaroj “Esperanto – originoj”, “Esperanto – biografioj”, “Esperanto – esplorprojektoj” kaj “Esperanto en la 21-a jarcento – lingvo kaj tutmondiĝo”, dum kiuj interalie Humphrey Tonkin, Federico Gobbo kaj Seán Ó Riain donis prezentadojn.

La simpozion, kiu estis ege internacia, partoprenis ĉirkaŭ 50 personoj el pli ol 15 landoj. Kvankam ĉiuj prelegoj estis en la angla, dum la paŭzoj kaj ankaŭ dum la diskutoj post la prelegoj aliaj lingvoj, precipe Esperanto, estis uzataj. La reagoj al la simpozio estis ege pozitivaj. Multaj personoj demandis, ĉu la prelegoj estos publikigitaj kaj kiam la venonta simpozio okazos en la Esperantomuzeo en Vieno.

Bernhard Tuidler

ALVOKO AL LA ENLERNEJAJ ESPERANTO- INSTRUANTOJ

Al kiu el ni neniam iu demandis (aŭ eĉ sin demandis) kiom da Esperanto-parolantaj, kiom da Esperanto-kluboj aŭ kiom da Esperanto-kursoj en lernejoj estas nacie kaj tutmonde? Tiam, kion respondi krom, ĝenate, “verdire, mi ne scias”!

Tamen, laŭ la kunteksto de la demando la konsekvencoj de tia respondo ege gravos por niaj agadoj. Fakte ni devas konscii, ke nun pli kaj pli da regantoj interesiĝas al nia movado; do, tio nin devigas disponi akuratajn registraĵojn kaj statistikojn ĉiam ĝisdatigitaj, por senhezite kaj loge (laŭeble!) respondi. Ekzemple: baldaŭ la franca landa asocio «Espéranto-France» devos prezenti al la franca edukado-ministerio bilancon de la unuaj dujaraj eksperimentoj de Esperanto-instruado en lernejoj. Ankaŭ pluraj instruistoj klopodas, por ke ilia lernejo kuniĝu tiun eksperimenton, sed ili penas konvinki sian estraron pro manko da altirfortaj argumentoj; tiukaze estus mirinde povi proponi larĝan eblecon de lernejoj interrilatoj kaj eĉ de ĝemeliĝoj internaciaj. Krome, oni povas konsideri ke se ju pli da lernejoj partoprenos en Francio ankaŭ des pli da alilandaj lernejoj malfermiĝos al la instruado de nia komuna lingvo; ĉu tiu kondiĉo ne esencas por ties evoluado?

Bedaŭrinde, tiuteme, ni tute ne kapablas pruvi tion, kion oni ofte diras, t.e. ke mondscale en multaj lernejoj Esperanto instruiĝas. Tamen, la aparta ilo de Edukado.net <https://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=lernejajkursoj> kien oni registru tiajn kursojn enhavas entute malpli ol dekduon da lernejoj bazaj kaj mezaj! Espereble, tio ne spegulas la veron!

Konsekvence, estas lanĉita plej larĝe kiel eble diskonigenda alvoko, por ke ĉiu Esperanto-instruanto en lernejoj nepre registru sian kurson aldonante ĝin al la ĉi-supra listo de kursejoj. La sukceso de nia movado postulas daŭran sciigon, kunlaboron, partnerecon, por ke ni ĉiuj povu efike argumenti favore al la enkonduko de Esperanto en lernejojn. tiucele, ĉiu el ni faru sian veran eblon.

Franca komisiono «Esperanto-ĉe-abituro»
A.Andre; G. Camy; M. Juy

PROTESTU PRO LINGVA DISKRIMINACIO EN UN

Karaj,

Unuiĝintaj Nacioj lanĉas tutmondan debaton pri la nuntempo kaj estonteco de UN – okaze de la 75-jara jubileo de la organizaĵo. Ĝi anoncis tion per nova retejo en siaj ses oficialaj lingvoj. Ĉar la sekretariato laboras en du lingvoj – la angla kaj la franca – oni atendus, ke minimume tiuj du lingvoj estus uzataj por kunordigi la debaton.

Sed jen kuriozaĵo. Se vi turnas vin al la franclingva versio de la retejo (<https://www.un.org/fr/un75>), vi legos, supre dekstre, “Contactez-nous (en anglais)”. Se UN volas engaĝi la mondon kaj jam en la komenco limigos sin al la angla lingvo (kontraŭ la propra lingva politiko, kaj kontraŭ ĉiuj normoj de inkluzivo), la rezultoj ne montriĝos tre inkluzivaj.

Ni petas vin – kaj precipe la franclingvanojn – rapide kaj trafe reagi, utiligante la paĝon “contactez-vous” por protesti kontraŭ tiu evidenta lingva diskriminacio. Franclingvanoj nepre uzu la francan en via reago. Parolantoj de aliaj lingvoj uzu aŭ siajn lingvojn aŭ la franca. Unuiĝintaj Nacioj apartenas al la tuta mondo, ne nur al anglalingvanoj. Ni malfermu UN al lingva diverseco! Ni forigu lingvan diskriminacion!

Cetere, ni jam sendis la unuan proteston. Aldonu vian voĉon. Ni vidu chu UN modifos la koncernan instrukcion...

Kaj bonvolu atentigi viajn geamikojn per sociaj medioj...

Humphrey Tonkin

LETERO AL HISPANAJ EŬROP-PARLAMENTANOJ.

Fine de oktobro, Hispana E-Federacio sendis leteron al ĉiuhispana parlamentano en la Eŭropa Parlamento. La celo estis informi ilin pri la nuna lingva situacio en Eŭropa Unio kaj prezenti Esperanton kiel eventuala solvo al tiu problema. Samtempe, oni demandis ilin pri la propra opinio rilate la rolon, kiun Esperanto povus ludi en la vera unuigo de la eŭropanoj. Ĉu ili respondos al HEF?

HEF

AMUZA NOVJARO EN FRANCIIO

Pasigu memorindajn tagojn ĉirkaŭ la jarfino, en gaja etoso, kun novaj amikoj, en belega loko, kun interesa programo. Venu kun geamikoj aŭ via tuta familio, kun ne-esp-istaj aŭ male.

Gustumu francajn frandaĵojn, varman etoson, kastelajn fantomojn. Post la silvestra festeno, dum maskobalo, ni dancu kune

informoj: gresillon.org/jarfino

aliĝu ĝis novembrofino en gresillon.org/aligho

Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono, F-49150 Bauge-en-Anjou, telefona respondilo 0033-241 891 034, kastelo@gresillon.org

UNU LECIONO PRI ESPERANTO EN ĈIU LERNEJA KLASO

Antaŭ kelkaj jaroj mi komencis popularigi la ideon, ke antaŭ instruado de Esperanto en lernejoj plej bone oni unue informu multajn lernejanojn pri Esperanto kaj ĝia hodiaŭa uzado - dum unu aŭ du lecionoj. Tiucele mi lanĉis la agadon "Unu leciono pri Esperanto" por lernejanoj. Komprenoble mi longavide ŝatus, ke ĉiu lernejano en la mondo havu tian lecionon - sed mi ja tre konscias, ke tia celo daŭros ankoraŭ iom...

Klaus Friese el Hamburgo, pensiiĝinta instruisto, verkis etan broŝuron pri la temo, en iu mi kunlaboris. Intertempe la broŝuro ekzistas en ses lingvoj (Esperanto, franca, angla, itala, germana, turka). Elŝuteblas sur <http://esperanto-klaus.de/> (serĉu "leciono").

Pliaj tradukoj komprenoble treee bonvenas.

Mireille Grosjean tre afable subtenas la agadon ĉe ILEI kaj metis multan materialon sur la ILEI-paĝon <https://www.ilei.info/agado/projektoj.php>

Ŝi ankaŭ verkis pri la agado en la Ondo de Esperanto

<http://sezonoj.ru/2017/05/ilei-13/>

Dum septembro kaj oktobro rusaj aktivuloj sub gvido de Irina Gonĉarova nun realigis brilan kampanjon por "Unu leciono pri Esperanto" kun grandioza sukceso: 12 homoj instruis, ili prezentis sume 27 lecionojn pri Esperanto en 15 klerigejoj. Ĉeestis entute 666 lernejanoj de la 5-a ĝis la 11-a klaso kaj aldone studentoj aĝaj ĝis 21 jaroj. Admirindege. Jen ekzemplodona agado, kiu bonege funkciis. Grandan gratulon al la gvidantino de la projekto "Unu leciono pri Esperanto por lernantoj" en Rusio, Irina Gonĉarova, kaj al ĉiuj kunagantoj: Aleksandr Blinov, 17-jara Dmitrij Timin, 16-jara Matvej Blinov, Ivan Sarkisov, Artemij Cirkovskij, Viktor Lagutin, 15-jara Roman Ralko, Dmitrij Ĵuravljov, Jelena Kuznecova, Eŭgeno Bojĉin, Ikar Akimenko. Eble en iuj aliaj landoj troviĝos ankaŭ aktivuloj, kiuj ŝatos survoĵigi similan kampanjon, ĉu?

Lu Wunsch-Rolshoven

E-KURSO POR VERKEMULOJ GVIDOTA VIVE EN INTERRETO

E-kurso de la Jagelona Universitato por verkantoj de artikoloj, blogoj, por tiuj, kiuj aspiras beletran verkadon aŭ simple, pli bonan skribadon en Esperanto. La skribaj aktivaĵoj ampleksos leksikon, gramatikon kun speciala atento al sintakso, zorgan laboron pri stilo. La programo respektos la individuan stilon de la partoprenantoj, okazos laboro pri ties disvolvado, krome, lernado per la stilo de modelaj verkintoj de la E-literaturo. Parto de la kurso estos dediĉita al plibonigado de la parolkapablo - dezirantoj povos elekti tiun eblon.

5-monata kurso (decembro 2019- aprilo 2020), kun lecionoj okazantaj 1-foje semajne. Niveloj: B2-C1 (meza kaj supera).

La lernado okazos en Interreto, vive. La studanto partoprenas ĝin, estante en sia hejmo. Ĉiusemajne oni renkontas en la studgrupo esperantistojn el pluraj landoj. La kurson gvidos sperta universitata instruistino, Maria Majerczak.

La oficialaj konfirmiloj pri la partopreno enhavas krom la konfirmo kaj blazono de la universitato, la markon de la internacia EAQUALS-kvalito de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato, kio plialtigas ilian internacian prestiĝon.

La diversajn internaciajn kursojn de la Jagelona Universitato finis multaj esperantistoj el 5 kontinentoj. Parto de la studantaro partoprenis plurajn kursojn.

Limdato por aliĝi: 30 novembro 2019 (aŭ poste, laŭ disponeblaj lokoj).

Pli da informoj pri la kurso: <https://docs.google.com/document/d/1JvimMeNl-nc3VJhi44f6NjbzDuaZvepiVR10BYdEW5c/preview>

Se, studinte ĉiujn informojn en la ĉi-supre indikita retpaĝo, vi decidis ALIĜI, bv. skribi al: [esperanto.instruado.jag.univ.pl\(ĉe\)gmail\(punkto\)com](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(ĉe)gmail(punkto)com) (ni publikigas la adreson de la kursoj en tia kontraŭ-spama formo).

Kore invitas vin
Maria Majerczak

Gvidantino de la Esperanto-instruado en la Jagelona Universitato

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de novembro 2019

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Estraro de EEU, HEF, Velimir Piškorec, Bernhard Tuidar, A.Andre, G. Camy, M. Juy, Humprey Tonkin, Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono, Lu Wunsch-Rolshoven, Maria Majerczak

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

